

LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPSALA.

Kosto de abono por jaro:	Pago por anoncoj:
kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 = cendoj 75	15 öre = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
= frankoj 4,25 = rejsoj 1000 = rubloj 1,50.	8 kopekoj — por daonpaĝa petitlinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Upsala, Sverige.* (Svedujo.)

III:a jaro.

Septembro 1898.

N:o 9 (33).

L'Espérantiste,

organo propaganda de la lingvo internacia Esperanto.

Kial ni ne parolis pli frue pri tiu ĉi nia kolego? Jes, kial? Ni volonte konfesas, ke nia silento estas krimo, kaj ni petas pardonon de tiuj, kiujn tio ĉi koncernas.

Kun la komenco de tiu ĉi jaro aperis — kiel bone scias niaj amikoj — en Francujo la monata gazeto nomata "*L'Espérantiste*". La fondado de nova gazeto ne estas facila afero, tio kostas monon, kaj ĝia daŭrigo kostas ne sole monon, sed ankaŭ laboron kaj multe da energio. Sed niaj francaj amikoj estas energiaj kaj laboremaj; ni, malrapidemaj nordanoj, povas multe lerni de ili, niaj sudaj fratoj. Dum ni meditadas por kaj kontraŭ, tiam ili agas, aŭ jam agis. Kaj — unu nacia esperantista gazeto estas jam fakto!

Kio estas do "*L'Espérantiste*", kaj kio estas ĝia faro?

Ĝi estas instruita apostolo de nia afero ĉe unu klera popolo. Kion mi diras — ĉe unu? Ne! Ĉar la popoloj, kiuj havas la francan lingvon kiel sian patran, ne estas ja sole la franca nacio. Ni ne forgesu Belgijon, Svisujon kaj la koloniojn, komprenantajn france. En la tuta regiono, kie franca lingvo estas parolata kaj komprenata "*L'Espérantiste*" disportadas la konigon de Esperanto, de ĝia celo kaj ĝia esenco.

Ordinare la esperantistoj tro malmulte parolas pri Esperanto. Ĝis tiam, kiam nia lingvo ne finis esti nur "nova volapük", ĝi ne ludos la rolon, kiun ni esperas, ne atingos la sukceson, kiun ni celadas. Lingvo internacia aŭ "mondlingvo" — ĉar tio estas egala afero ĉe la granda publiko — remetis al ordinaraj homoj ĉiam la fantomon de volapük. Tio estas por ili nur nuda nomo, sed nomo, kiun ili konas, kvankam ĝia esenco estas tute nekonata. Ni scias ja el nia ĉiutaga sperto, ke ni pli facile konatiĝas kun persono, kies nomon ni aŭdis jam per niaj amikoj. Tiamaniere rilatiĝas ankaŭ la afero de Esperanto. Nia lingvo ne estu nur nekonata heredanto de antaŭulo, kiu mortis pro ftizo aŭ febro klimata, lasinte la eĥon de sia nomo sonantan en

la oreloj de ĉiuj homoj. Ni ne miras, ke la gazetaro silentas, skeptika pro antaŭaj spertoj. Sed ni devas paroli mem, kaj tio fariĝas plej bone per tielaj gazetoj kiel "l'Espérantiste". La publiko devas scii, ke, kiel kaj kia ekzistas Esperanto. Kaj pri tio sciigadas la dirita gazeto per artikoloj en franca lingvo, verkitaĵ de homoj science kleraj en elokventa formo kun enhavo konvinkanta kaj interesa.

La solaj rubrikoj mem de ĝiaj artikoloj subrakontas pri la interesa enhavo. Krom tiaj kiel "Nia programo", "Tio kion ni volas", "Kiel propagandadi Esperanton?" ni trovas la sekvantajn rubrikojn: Lingvo franca kaj Esperanto, Ĉu la lingvo internacia devas esti farita por la instruituloj? Niaj lingvoj kaj Esperanto, Ĉu la lingvo internacia devas esti perfekta? Lingva evolucio kaj Esperanto, S-ro Francisque Sarcey kaj Esperanto (polemiko), Ĉu lingvo latina aŭ Esperanto? Formigo de Esperanto, La konfuzo de lingvoj en Aŭstrujo, Internacieco de Esperanto, La movado esperantista kaj la movado paca.

Per Kroniko en Esperanto kun apuda franca traduko la legantoj havas detalajn sciigojn pri la stato kaj progresoj de nia lingvo kaj krom tio la komencantoj ricevas oportunan materialon por lernado. Kiel bona rimedo por tio ĉi lasta servas ankaŭ modeloj de interparolado pri ĉiataĝaj aferoj en ambaŭ lingvoj kune kun klarigoj de apartaj esprimoj.

"L'Espérantiste", estante organo de la *Societo por la propagando de Esperanto*, enhavas ankaŭ la novaĵojn, statutojn k. c. de tiu ĉi societo *).

Certe, ĉiu amiko de nia afero bone komprenas, kian grandan gravecon havas la dirita gazeto, kian signifan helpon ĝi estas kapabla alporti al la progreso de nia lingvo, estante redaktata de personoj tiel kompetentaj, tiel sindonitaj por la afero esperantista kiel estas s-roj L. de Beaufront kaj René Lemaire kaj iliaj kunhelpantoj. Ni ne povas manki deziri al ili plenan, konstantan sukceson en ilia laŭdinda entrepreno, kiu sendube ne restis sen dekuraĝigaj malfacilaĵoj precipe dum la unuaj tempoj de komenco.

Kiam aperos la sekvantuloj de "l'Espérantiste" en aliaj landoj?

Paul Nylén.

Novajĵoj.

Novaj eldonoj.

Per la "*Kapitalo de D-ro Zamenhof*", kiun administradas la societo "Espero" en Peterburgo, estas nun eldonita n-ro 98 en la nomaro de verkoj: "*A few words on the international language Esperanto. Translated by R. H. Geoghegan*", angla eldono de la propaganda bruŝureto.

Per la sama "Kapitalo" estas ankaŭ presata nova eldono de la angla lernolibro n-ro 52. Kiam ĝi estos tute preta, ni sciigos pri tio.

La Klubo Esperantista en Upsala presis aparte la nomaron de verkoj nun riceveblaj (ĝis n-ro 115): "Literaturo de la lingvo internacia Esperanto ĝis junio 1898." Tiu ĉi nomaro portas la numeron X inter la eldonoj de la Klubo.

* * *

*) Pri abono de l'Espérantiste rigardu la anoncon sur la lasta paĝo de tiu ĉi numero!

— La Odesa Filio de la societo "Espero" decidis ŝarĝi sin per la zorgoj pri la filinoj de sia mortinta membro, L. A. Davidoviĉ, kaj sciigas, ke ĉiuj oferoj devas esti de nun direktataj al la kasisto de la societo, d-ro I. M. Lucenko (Odessa, Rusujo, uĝol Ĥersonskoj i Dvorjanskoj). La sciigoj pri la ŝ-rinoj Davidoviĉ kaj pri la senditaj oferoj estos presitaj en "L. I." Al ĉiuj personoj, kiuj ĝis nun sendis oferojn, la societo esprimas sian dankon.

* * *

Pri Esperanto parolis. En Rusujo — la n-roj 159, 177, 178 kaj 179 de *Smolenskij Vestnik* enhavas multajn favorajn artikolojn; n-ro 184 de tiu sama gazeto donas priskribon de l' malfermo de la Smolenska Filio; n-ro 188 enhavas sciigon pri la ŝanĝo de la komitato de la Filio.

Vitebskija gubernskija vjedomosti parolis nefavore kaj mokante pri nia lingvo kaj afero (en kiuj numeroj, ni ne scias; rig. la artikolon de s-ro Zakrjevski!).

— En *Stockholms Dagblad* n-ro 243, la vespera eldono de la 28. V. kaj en *Dagens Nyheter* de la 31. V. estis legata noto pri la kunveno de la Klubo Esperantista de Stokholmo la 27-an de majo.

— N-ro 51 de la dupluaĵea gazeto *La Plume Sténographique* sciigas, ke kurso de Esperanto estis malfermita, la 24-an de Aŭgusto ĉe la knabina lernejo plialta de Limoges, de fraŭlino Zabylon d'Her, profesorino de artikulacio por surdomutuloj.

— En la pasinta unua duono de tiu ĉi jaro multaj francaj kaj aliaj gazetoj parolis pri nia lingvo. *L'Espérantiste* jam notis ilin en sia kroniko, tie ĉi ni nur represas iliajn nomojn: *Vie montpelliérise, Journal de Nyon, Courrier de la Côte, Courrier des Alpes, Le Patriote Morézien, L'Indépendant de Saône-et-Loire, Journal de Louhans, Echo Pierrois, Journal de Charolles, Lyon Républicain, L'Yonne, Le Réveil du Dauphiné, L'Annonce Timbrologique, Le Champenois, Le Réveil de la Marne, Le Courrier du Nord-Est, Le Vigneron Champenois, La Croix de la Marne, L'Echo du Centre, Le Républicain de Loir-et-Cher, Le Progrès de Loir-et-Cher, L'Indépendant de Loir-et-Cher, La Résurrection, Le Timbrophile Gaulois, Le XX-e Siècle, Le Peuple, La Croisade Française, La Paix par le Droit, Le Mondain Bordelais, La Tribune, Le Pays Wallon, Le Moniteur des Instituteurs primaires, O Paiz* (Brazilujo), *Revista Brasileira, Le Journal de Bruges, Les Alpes Républicaines, Le Radical de la Drôme, Le Petit Gessien.*

— La aŭgusta numero de *O Philatelisto do Occidente* enhavas, inter aliaj Esperantaj tekstoj, la bibliografian artikolon de V. G. represitan el n-ro 6—7 de "L. I." kun apudemetita portugala traduko.

— >:❖:< —

Malfermo de la Filio de la Societo Espero en Smolensk.

Kopio de protokolo.

Je la dudek tria tago de Aŭgusto (malnova stilo) de la nuna jaro en la unua horo de la tago la fondantoj de la Smolenska Filio de la Peterburga Societo "Espero" por vastigado de la lingvo internacia "Esperanto" en la nombro de 19 personoj alpaŝis al la malkovro de la suprenomita filio.

1) Ĉe la malfermo de la kunsido unuvoĉe estis elektita kiel prezidanto de la kunveno Leono Ĉerevin, kaj sekretario Vilhelmo Pileckij.

2) Laŭ la § 10 rimarko 2 de la "Regularo de la Societo" ĉiuj membroj estis konfirmitaj kiel efektivaj membroj de la filio.

3) Aleksandro Zakrjevski diris kelkajn vortojn pri la signifo kaj la celoj de la lingvo "Esperanto", kiel egale pri la celoj de la malfermata filio.

4) Sinjoro Laskin tralegis kelkajn plej ĉefajn paragrafojn el la "Regularo".

5) Per la komuna kunveno estis difinita la jara membrapago en la mezo de du rubloj.

6) Poste estis komencitaj la elektoj kaj estis elektitaj: Prezidanto de la komitato: Nikolao Lesli; membroj de la komitato: Nilo Engelhardt, Vilhelmo Pilecki, Leono Meder, Aleksandro Zakrjevski kaj Georgo Vannaĥ; kaj kandidatoj: Aleksandro Teterev kaj Vasileo Cvietkov.

7) Per la membroj de la komitato estis decidita aranĝadi ĉiusemajne praktikajn vesperojn, je la mardoj en la 7 horo de vespero, en la loĝejo de Smolenska Kredita Societo.

8) Por la rajto senpage uzadi la loĝejon de la Kredita Societo, estis decidita esprimi la profundan dankecon al s-ro Leono Ĉerevin.

9) Por la energiaj kaj penemaj laboroj en la vastigado de la lingvo "Esperanto" esprimi la dankecon al s-ro Aleksandro Zakrjevski.

10) Unuvoĉe estis decidita sciigi per telegramo la aŭtoron de "Esperanto" Doktoron Zamenhof pri la malfermita filio de "Espero" en Smolensk.

11) En la 2¹/₂ horo de la tago la kunsido estis finita.

Tiu ĉi protokolo estis subskribita en la originalo:

Prezidanto **Ĉerevin.**

Sekretario **Pilecki.**

Enhavo de la telegramo, sedita al D-ro Zamenhof: "Varsovio, Dzika al D-ro Zamenhof. Hodiaŭ estis malfermita filio de Espero en Smolensk. Ni trinkas por via sano. Smolenska filio."

La telegramo estis sendita en esperanto, estas tre scivole scii, en kia stato D-ro Zamenhof ricevis ĝin (t. e. ĉu sen eraroj).

*

Laŭ decido de la Komitato en la 9 de septembro (n. s.) estas elektita en la nombron de membroj de komitato anstataŭ s-ro Zakrjevski*), s-ro Aleksandro Teterev, kiu estas difinita la sekretario de la filio; inter la kandidatojn de la komitato estas elektita s-ro Laskin.

En la originalo estas subskribita:

Prezidanto **Lesli.**

Pro sekretario: **Pilecki.**

Konsisto de la komitato: Prezidanto: N. P. Lesli, sekretario: A. A. Teterev, kasisto: V. M. Pilecki, bibliotekisto: vakanto.

El Smolensk.

Estas nur kelke da semajnoj, de kiam ekzistas en Smolensk filio de la societo "Espero", ankoraŭ ĝi ne komencis agadi, kiam jam en multaj gazetoj komencis aperadi diversaj notoj, mokantaj kaj nian lingvon kaj ankaŭ la Smolenskan filion. Kompreneble mi ne elnomados ĉiujn tiujn ĉi notojn, ĉar ili estas tiel malsaĝaj kaj ne havantaj fundamenton, ke ili meritas eĉ nenian atenton. "La hundo bojas — la vento portas" diras unu rusa proverbo. Sed unu el tiaj ridindaj notoj igas min paroli kelkajn vortojn pri tiuj ĉi linioj. Unu el rusaj gazetoj "Vitebskija gubernskija vjedomosti" (= Vitèbskaj guberniaj sciigoj) en unu el siaj numeroj por la monato Aŭgusto, alkondukante eltirojn el la regularo de nia filio, aldonas: "Tielmaniere, se en Tetjuŝi", *Ceboksary*

*) Ĉar li transloĝiĝis en Arĥangelsk.

aŭ *Carevokokŝajsk* *) troviĝos volontuloj sin okupadi je la ellernado de Esperanto, la Smolenska filio de la societo "Espero" havos la plezuron korespondadi kun la loĝantoj de tiuj ĉi "gloraj" urboj. La ŝanĝo de "pensoj" estos sendube tre instrua kaj interesa. La *Ĉeboksary* komunikigados pri la kosto de fiŝoj kaj lano, k. c. La respondaj korespondaĵoj kompreneble portados la konforman karakteron . . ."

Kredeble la redakcio de la "*Vit. Gub. Vjed.*" nenion scias pri la lingvo Esperanto. Mi konsilas al la estimata redakcio de la suprenomita gazeto tralegi antente eĉ la "mallongan sciigon pri nia lingvo", tiam li ekscius, ke Esperanto estas lingvo internacia "*difinita nur por la faciligo de interkomunikigoj de personoj, apartenantaj al diversaj nacioj*". La Smolenska filio havas nenian bezonon korespondadi kun la loĝantoj de tiuj ĉi kvazaŭ gloraj urboj; ĉar por tiuj ĉi komunikigoj ni havas nian propran rusan lingvon, Esperanto do servas nur por la *internacia korespondado*. Nia ideo estas multe pli sankta ol ia vana korespondado kun la komercajstoj-tataroj de la suprenomita urboj.

Similan korespondadon mi lasas por la korespondanto de la "*Vit. Gub. Vjed.*", tiam ĝi havos multe pli interesajn sciigojn por la legantoj de tiu ĉi gazeto. Mi nur miras kiel al la Vitebskanoj ne tedos legadi similan gazeton, kiel "Vitebskajn Sciigojn", plenan da sensencaĵoj kaj ĉikanaj. Kredeble korespondanto de la "V. S." estas tataro, ke li amas tiel ofte rememorigadi pri la Kazanska gubernio, estinta lia patrujo.**)

*

Kompreneble neniu el la saĝaj homoj turnos sian atenton al ia simila babilado, kiu tre ofte aperadas en la rusa preso, sed tamen ni devas ion fari kontraŭ tio. La publiko, konfuzata per diversaj similaj sensencaĵoj, ne scias mem, al kiu ĝi devas kredi aŭ al la broŝuroj, dediĉitaj al Esperanto, aŭ do al similaj gazetoj, kiel "Vitebskaj Sciigoj". Tiuj similaj notoj kaj artikoloj, laŭ mia opinio, ne devas restadi sen respondoj, kiujn povus legadi la publiko. Por tio ni, rusaj esperantistoj, devas havi ian gazeton, dediĉitan al lingvo internacia, sed nepre eldonatan en rusa lingvo. La bezonon de simila organo unue eksentis la francaj esperantistoj, kreinte la esperanto-francan gazeton "L'Espérantiste". Nun do mi min turnas al ĉiuj rusaj amikoj de nia ideo, ke ni nepre devas havi similan organon. Gazeto simila povus portadi la titolon ekz. "Komuna afero" (Obŝĉeje djelo) kaj povas esti eldonata eĉ du fojojn ĉiumonate, sed nepre en rusa lingvo, ke ĝin povu legadi la tuta rusa publiko eĉ nenion scianta pri Esperanto. Per tia maniero ni povas multe helpadi al nia ideo kaj malhelpi al la disvastigado de la diversaj malveraj sciigoj, respondante kaj klarigante la signifon de la lingvo internacia. Mi tre petas personojn, kiuj kunsentas kun mi en tiu ĉi afero, ke ili volu eniri kun mi en korespondadon rilate tiu ĉi mia propono.

*

Tiu ĉi sama gazeto "Vitebskaj guberniaj sciigoj" en unu el siaj numeroj diras: "Sinjoro Teterev komencis tre propogandadi tiun lingvon Esperanto en la gazeto 'Smolenskij Vjestnik', kial do ne ian lingvon 'Tararabumbia'?"

*) Malgranda rusaj urbetoj.

**) Kiel estas sciata, la Kazanska gubernio estis antaŭe tataro lianeco.

En la Smolensk mem la lingvo Esperanto sin trovas en sufiĉe bonaj kondiĉoj; al tio ĉi helpadas tre favoraj artikoloj, aperantaj en la loka gazeto "Smolenskij Vjestnik" (Smol. Kuriero), apartenantaj al la plumo de la sekretario de tiu gazeto kaj ankaŭ sekretario de la juna Smolenska filio, s-ro Aleksandro Artamonoviĉ Teterov.

A. Zakrjevski,

Agento de l' Esperanto.

Arĥangelsk, Troickij prospekt, dom Ananina.



El Heine.

I.

Mi sonĝis pri sovaĝa am-pasi',
Pri belaj mirtoj kaj violoj,
Pri dolĉaj lipoj kaj kruel-paroloj
Kaj pri malluma kanto-melodi'.

Nun tiuj sonĝoj estas malproksimaj
Kun la plej dolĉ-amata sonĝaper',
Kaj restis nur sur tiu ĉi paper'
La flama kanto kun la molaj rimoj.

Vi restis, kanto-orf'! Kunflugu for!
Vi serĉu ĝin, la sonĝo-ombbron mutan,
Eltrovu ĝin, salutu ĝin el kor'
Al sonĝo-ombro — ombran spir-saluton!

II.

Mi sonĝis: malĝojis la lun' en aer',
Malĝojis la brila stelaro,
Mi iris, mi iris kun kora sufer'
Al mia fraŭlino multkara.

Mi venis, mi kisis kun kora pasi'
La ŝtupojn, de ŝi transiritajn,
Mi kisis la platojn malmolajn, de ŝi,
De ŝia trenaĵo tuŝitajn.

Kaj estis malluma la nokta pejzaĝ',
Malvarmaj — la ŝtonoj de l'korto,
Kaj el la fenestro rigardis vizaĝ',
Vizaĝo pli pala ol morto.

A. Kofman.



La Vorto Dia en lingvo internacia.

Tiam mi alturnos al popoloj klaran lingvon, por ke ĉiuj alvoku la nomon de la Sinjoro kaj servu al Li en konsento. (Cefanĵo III 9.)

Al ĉio dirita kaj skribita pri traduko de la Sankta Skribo mi, kiel konkludo, povas nur aldoni, ke la lingvo, en kiu la Vorto Dia ne estas skribita kaj legata, ne estas lingvo.

Estas konata, ke en la plej gravaj aferoj oni devas esti plej singardema kaj estas plej necese antaŭe bonege konsideri ĉiujn farotajn paŝojn, por ke ili ĉiuj estu ĉiuflanke konvenaj por la celo de la intencita afero; ĉar eĉ unu necerta paŝo povas defekti la tutan laboron kaj konduki ĝin al necelokonformaj rezultatoj.

Mi bone scias, ke la grandaj verkistoj-tradukistoj, kiujn jam posedas nia lingvo, entreprenante la grandegan laboron de bibliotraduko, ĉirkaŭrigardos la aferon de ĉiuj flankoj kaj rilatoj, kaj ili estos en stato forigi ĉiujn eblajn nedezirindajn sekvojn. Mi estas eĉ konvinkita, ke ĉia demando en tiu ĉi rilato, sur kiun niaj grandaj pensantoj-esperantistoj ne turnis sian atenton, sendube ne estas atentinda. Tamen mi volas turni la atenton de niaj amikoj sur unu flankon de l' afero de la bibliotraduko, kiu, laŭ mia opinio, aparte postulas esti treege singardema. Mi kuraĝas tion ĉi fari, ĉar al mi la danĝero ŝajnas tiel granda, ke mi ne povas doni al mi la rajton silenti.

La lingvo internacia estas kaj devas esti propraĵo de la tuta mondo.

En la literatura kaj scienca rilatoj, ĝi havas la celon transdoni la produkt-
aĵojn de l' saĝo de ĉiu nacio al la tuta mondo kaj tielmaniere ĉiuj diversna-
cianoj komuniĝas kaj ŝanĝas la ideojn inter si, kio nepre servas al perfekt-
igado de iliaj sciadoj. La Sankta Skribo estas ankaŭ propraĵo de la tuta
mondo. Kaj kia propraĵo! Ĝi estas la fonto de l' vivo por ĉiuj homoj. La
traduko de la Biblio en la lingvon internacian ne povas havi la celon konat-
igi ĝin al iaj nacioj, ĉar ĝi jam longe estas sufiĉe konata al ĉiuj kulturaj
nacioj. Tiu ĉi afero havas celon tute alian, pli gravan, nome: fari la lingvon
vere komuna al ĉiuj nacioj, unuigante ĉiujn la diversnaciojn en tiel grava
objekto, kiu de sia flanko estas ankaŭ komuna al ĉiuj homoj, kaj donante al
ili la eblon kune legadi tiun ĉi vivigantan verkon, sin okupadi je ĝi kaj in-
terŝanĝadi pensojn pri ĝiaj enhavaĵoj. Sed ni scias, ke ĉia el diversaj reli-
giaj partioj ĉerpadas el la Sankta Skribo la ideojn, konformajn je la senco
kaj mondrigardo de siaj religiolernaĵoj. Demande, en kia formo kaj laŭ kia
teligiolernaĵo la lingvo internacia devas prezenti al la mondo la Biblion? Se
ĝi prezentos ĝin en formo, en kiu ĝin havas ia unu el la religiaj sektoj, kies
ideoj kaj dogmoj en multaj esencaj punktoj nepre kontraŭstaras al tiuj de
aliaj sektoj, — ĉu tio ĉi ne malaltigos la indon de nia lingvo en okuloj de
ĉiuj tiuj religianoj, kiuj vidos en ĝi esprimon de ideoj, kontraŭaj kaj fremdaj
al la ideoj, en kiuj ili estas konvinkitaj, kiujn heredigis al ili iliaj prapatroj?
En tiu ĉi okazo ne sole la celo ne estos atingita, sed eĉ devenos rezultato,
tute kontraŭa al la dezirinda celo, kaj la afero de bibliotraduko ne sole ne
helpos, sed eĉ signifas malhelpos al la disvastigado de nia lingvo, ĉar oni
juĝas nian lingvon kaj kune la tutan esperantistaron kiel, por tiel diri, trud-
antan fremdajn ideojn. La influo, kiun nature devas havi kaj, kiel argumen-
tas historiaj faktoj, — por ekzemplo: la influo de la bibliotraduko de Luter
por la disvastigado de la altgermana dialekto — ordinare havadas traduko
de l' Biblio por la disvastigado de la lingvo, en kiun ĝi estas farita, en nia
okazo estos kontraŭefikanta por la plejmulto da popoloj.

Oni ordinare diras, ke la traduko de la Biblio devas esti farata de la
originalo mem. Sed ĉiuj tradukoj de la Biblio, de ĉiuj landoj kaj tempoj,
estis ja farataj aŭ de la originalo mem, aŭ de la greka aŭ la latina traduko,
kiuj ankaŭ estis farataj de la originalo mem; kaj tamen ni scias, ke en kelk-
aj lokoj la tradukoj de malsamaj religiaj partioj ne estas konsentaj. La
stilo de la hebrea lingvo, kiel la stilo de ĉiuj antikvaj orientaj lingvoj entute,
ofte ne sufiĉe klare difinas la sencon kaj povas esti komprenigita dusence.
Estas ankaŭ multaj frazturnoj en la antikvaj lingvoj, kies uzado kaj senco
kvankam estis klare difinataj por la samtempoj de la skribinto, en buŝoj
de kiuj la lingvo estis viva, sed estas forgesitaj en la postaj tempoj, kiam la
lingvoj ĉesis esti uzataj por ĉiutaga vivo. Kaj en tielaj okazoj la tradukistoj
de la Biblio tradukis ĉiu laŭ siaj kredaĵoj kaj ideoj.

Vere, tielaj lokoj en la Sankta Skribo sin trovas tre malmultaj; sed eĉ
unu loko, ne konforma je la kredaĵo de la leganto, estas sufiĉa por sensankt-
igi la tutan libron en liaj okuloj kaj senigi ĝin ĝian Diecon; ĉar Dia verko
devas enhavi en si nenian neveraĵon.

Ni povas diri, ke ĉio tio ĉi ankoraŭ ne malhelpos al la disvastigado de
la lingvo internacia, ĉar en nia tempo la religio estas tute apartigita de ĉiuj
la aliaj branĉoj de l' vivo kaj ĝi havas jam nenian aŭ tre sensignifan influon
por la lastaj. Sed estas nenia dubo, ke la vera celo de la bibliotraduko en
nian lingvon neniel estos atingita, se por iaj, eble plej multaj homoj ĝi ne

havos sian veran sanktecon. Ĝi estos legata de ili tiel, kiel oni legas ĉiujn aliajn homajn verkojn, sen estimego, sen kora sento, kaj la leganto ne trovas en ĝi la spiritan nutraĵon por lia animo kaj la konsolantan esperon por lia koro. Tiel rilatiĝo de plej multaj nacioj al la internacia bibliotraduko neniel povas esti la vera celo de nia afero; ĉar la vera celo de la traduko de la Biblio en nian lingvon, laŭ mia opinio, estas nur, ke la *Vorto Dia* estu legata en nia lingvo, la *Vorto Dia*, kiu donas al la homo tion, kion serĉas lia koro, kiu sanigas la doloran animon, kiu povas doni feliĉon al la malfeliĉuloj. Sole tio ĉi estos la gloro por nia lingvo. Kaj mi ripetas, ke la lingvo, en kiu la *Vorto Dia* ne estas skribita kaj legata. — t. e. legata kiel *Vorto Dia*, ne kiel simplaj homaj vortoj — ne estas lingvo. Sed kiel do nia lingvo, kiu estas kreita por la tuta mondo, povas doni al la mondo unu komunan Biblion por ĉiuj nacioj kaj religianoj? Jen demando!

Mi ne volas tien ĉi por ekzemplo citi versojn de la Sankta Skribo, je kiuj diferencas inter si diversaj religiaj lernaĵoj, ĉar tio ĉi ŝajnas al mi tiel superflua, kiel neĝustloka, kaj "se ne malutilos, ne utilos".

Estas necese, ke ĉiuj amikoj de nia kara, aminda lingvo, kiuj scias eĉ juste taksu la indon de la trezoro, kiun la homaro havas en la sankta Biblio, serioze konsideru pri la antaŭstaranta gravega afero kaj ĉiu donu sian konsilon. Eble prosperos al ni atingi la veran celon de la bibliotraduko en la lingvon internacian, ke la lasta donu al ĉiuj homoj, ĉiuj adamidoj unu komunan Sanktan Skribon, por ke ĉiu trovu en ĝi la savon kaj benon por lia animo.

Estus ankaŭ tre necese, ke en la tradukado de la Sankta Skribo partoprenu iaj konataj teologiistoj kaj piuloj de diversaj religiaj partioj.

Kaj la Sinjoro sendu Sian Sanktan Spiriton al la tradukontoj kaj kondukĵi ilin sur la vera vojo!

* * *

Mi volas ankoraŭ fari unu proponon, kiu estas tre simpla, sed ŝajnas al mi tre grava por la afero. Laŭ mi la "Lingvo Internacia" devas malfermi rubrikon sur ĝiaj paĝoj por "Rimarkoj por la bibliotraduko" kaj inviti ĉiujn esperantistojn, kiuj scias la Biblion, alsendi siajn rimarkojn kaj opinio-proponojn pri traduko de iaj ne klaraj versoj aŭ vortoj en la Biblio. Tielmaniere en la tradukon eniros ia kvanto da materialo, ellaborita de la publiko, kaj la tradukado estos en certa grado publika, kio sendube estos grava cirkonstanco por la vera celo de la afero.

Kaj la Sinjoro sendu Sian lumon, Sian veron!

Dvinsk, Aŭgusto 1898.

Homarero.

—>⊗<—

Ankoraŭ pri skribado de propraj nomoj

Oni multe skribis pri la ortografio de la propraj nomoj aperantaj en Esperanta teksto. Tiu ĉi demando estas malfacila. Ĝi ne estas speciale Esperanta demando, ĉar ĝi aperas tiel same en ĉiuj lingvoj ĉiutage.

Nomoj bezonas esti kiel eble plej malsimilaj inter si, almenaŭ se ili povas havi kolision unu kun la alia.

En ĉiu lingvo ekzistas limigita nombro da sonoj; kaj la nomoj havas sian plej grandan kaj plej gravan uzadon en la skriba lingvo.

Tial aperas ofte la penado fari la ortografian elvidon de nomoj kiel eble plej propreca. Kaj ofte oni trovas nomojn, ne skribatajn eĉ konforme al la leĝo de la lingvo, en kiu ili havas sian hejmon.

Estas tute indiferenta afero, ĉu ni nomas tablon "tablo" aŭ "abcd", nur supozite ke ni komprenas unu la alian. La tablo do ne protestos. Sed la nomo de unu persono estas tiel intime ligita kun la sociala kaj politika ekzistado de l' persono mem, ke estas afero tiom same grava, *kiela* ekzistas la nomo kaj *ke* ĝi ekzistas. Tial estas tre grave, ke ĝia integritato estu konservata.

Tio ĉi preskaŭ ĝis sama grado koncernas geografiajn nomojn.

Sed ankaŭ en la parola lingvo la nomoj havas grandan signifon, kaj pro tio oni estas volema scii ilian ĝustan elparolon. Legante aŭ parolante pri unu persono aŭ loko oni devas elparoli la nomon. Kaj kial oni ne devus ĝin elparoli *ĝuste*, t. e. tiel, kiel ĝin elparolas la persono mem aŭ kiel la loko estas nomata de siaj loĝantoj? Sed ĉar la sonaro kaj sonnuancoj de l' diversaj lingvoj multe diferencigas, kaj ĉar, — tiel kiel en unu sama lingvo la individua elparolo de unu persono diferencigas de tiu de la alia —, unu nacio povas nur malfacile imitadi la sonajn nuancojn de la lingvo de alia, tial oni ne devas postuli ion pli ol proksime korektan elparolon, ŝieman elparolon.

Tio, kion oni unue kaj antaŭ ĉio bezonas scii por povi elparoli fremdan nomon, estas la situacio de l' akcento. Mi pensas, ke oni povus sukcese rimarkigi tiun ĉi per dupunkto (:), ekzemple *Madri:d*, Stephenson (*Sti:vensn*), Shakespeare (*Ŝe:kspir*).

Koni la longecon aŭ mallongecon de l' vokalo akcenta, estas ankaŭ grave. Oni facile povas sciigi pri tio ĉi, metante la dupunkton post la vokalo, se ĝi estas longa, post la *konsonanto* sekvanta ĝin, se la vokalo estas mallonga, ekz. *Na:poli*, *Stok:holm*.

*

Se oni povas iel doni iajn regulojn akcepteblajn por skribado de fremdaj nomoj propraj en ia ajn lingvo, kun tia kondiĉo — mi pensas — la reguloj, kiujn donis s-ro Arnold sur la paĝo 106, "L. I." de tiu ĉi jaro, estas la plej akcepteblaj. La paragrafo 3 estas la sola donanta malfacilaĵojn. Supozu, ekzemple, ke unu artikolo en nia lingvo parolas pri sinjoroj Mällberg, Möllberg, Müllberg, Myllberg, Mällberg, Mallberg, Mollberg, Mullberg, Millberg kaj Mellberg. Ne taŭgas en tia okazo simple anstataŭi *ä* kaj *ö* per *e* skribante *Mel:berj*, anstataŭi *ü* kaj *y* per *i*, anstataŭi *ä* per *o*; nek sole forigi la maloportunajn suprasignojn.

Plej bone estus sendube anstataŭi *ä*, *ö*, *ü*, per *ae*, *oe*, *ue*; *y* per *ui*; *ä* per *ao*.

Oni povus per tia transskribo plej proksime al la elparolo signi ekzemple la nomojn de la svedaj urboj Göteborg (*Joetebor:j*) kaj Nyköping (*Nui:ĉoeping*).

Paul Nylén.

Jurnalistoj observu!

La redakcio de la gazeto "Smolenskij Vestnik" petas niajn amikojn sendadi al ĝi diversajn artikolojn, notojn, korespondaĵojn en Esperanto, kiujn ĝi tradukados en la lingvon rusan kaj presados en sia gazeto. Adr. de la redakcio: al la Redakcio de "Smolenskij Vestnik", strato Blagoveščenskaja, domo de Protasov. *Smolensk* (Rusujo).

Dekdu movadoj de la tero.

(laŭ K. Flammarion.)

Antaŭ ne longe oni trovis la dudekan teran movadon, kiu kune kun jam sciitaj teraj movadoj montrigas la malordinaran moveblecon, malpezecon kaj "kosman"*) sentemecon de la malgranda etera globeto, sur kies supraĵo plenumiĝas niaj sortoj.

Tiu-ĉi dudeka movado estas polusa movado: la norda poluso, t. e. la fino de la akso, ĉirkaŭ kiu turniĝas nia planedo ne estas senmova punkto sur la tersupraĵo: ĝi moviĝas senĉese, nek du tagoj restante sur unu loko; ĝi translokiĝas, farante neregulan kurban linion ĉirkaŭ centra punkto.

Tiu-ĉi ŝancelado ne restas memsama dum ĉiuj jaroj, ĉar ĝi dependas de translokadoj de atmosferaj masoj, de aeraj kaj maraj fluadoj k. t. p. Ĝi, cetere, estas malgranda, ĉar tuta ĝia amplitudo estas ne pli ol 15—17 metroj. Sed kiel ajn estas malgranda tiu-ĉi ŝancelaĵo, ĝi tamen estas tre interesa: la tuta terglobo ŝanceliĝas kaj la larĝitudoj de tutaj landoj konstante ŝanĝiĝas...

Tial ni povus diri, ke la terglobo sin turnas per influo de vento, kompreneble ne tiel kiel ia objekto fluganta kun vento, sed pere, danke al translokado de atmosferaj masoj, kaj ni ne devas forgesi ke nia tero pezas 5,957,930 kvintilionojn da kilogramoj (t. e. 5,957,930,000,000,000,000,000,000). Kiu scias, kiajn konsekvencojn tio-ĉi havus, se oni nur perfekte kaj precize scius la grandegajn fortojn, elspezatajn por eksciti similan movadon?

Kiom da fortoj sin perdas sen utilo! — Ventoj, fluadoj, alfluo k. t. p....

Tie-ĉi oni devas rememori la vortojn de Arhimedo: "donu al mi levilon kaj mi turnigos tutan universon."

Ni jam sciis dekunu movadojn de nia planedo. Oh! granda Galileo! Kiel moviĝis antaŭen la scienco de la tempo, kiam oni devigis vin sur genuoj rifuziĝi de via "herezo"... ke la tero havas du movadojn! (*E pur si muove!*)

Ĝi estas tre interesa tranomi tie-ĉi ĉiujn movadojn de nia terglobo, fluganta en la ĉiela spaco:

1) La tero sin turnas ĉirkaŭ sia akso dum 23 horoj 56 minutoj kaj 4 sekundoj. Ni ne haltu je tiu-ĉi movado sciata en nuna tempo de ĉiu lernaoto. Tamen ni rimarku, ke ĝi estas malrapida, ĉar ĝia ekvatora rapideco estas 465 metroj en sekundo, ĉe 40° de larĝitudo = 375 metroj, ĉe 50° = 300 metroj, ĉe 60° = 234 metroj kaj ĉe la polusoj = 0. Tiu-ĉi turniĝo de la tero ĉirkaŭ sia akso klarigas la ŝajnan dudek-kvarhoran turniĝon de ĉielo, suno, luno, planedoj kaj steloj, kiu sen tio-ĉi estus ne komprenita. La suno, troviĝanta de ni je 149 milionoj da kilometroj decus flugi kun rapideco = 39 milionoj da kilometroj dum horo, por dum tago ĉirkaŭiradi malgrandan, preskaŭ nerimarkatan globeton, ĉar tiu-ĉi lumilo estas 1,283,000-oble pli granda kaj 324,000-oble pli peza ol la tero; la plej proksima stelo, kiu estas 275,000-oble pli malproksime de ni ol la suno kaj ankoraŭ pli peza ol tiu-ĉi lumilo devus ĉirkaŭiradi la teron kun rapideco de 10 trilionoj 725 bilio-

*) De la vorto: "kosmos" = universo.

noj*) kilometroj dum horo, kaj aliaj steloj ankoraŭ pli rapide ĝis senfineco! La turniĝo de la tero jam estas simple kaj senpere pruvita kaj la hipotezo pri dudekkvarhora ĉirkaŭrado de steloj ĉirkaŭ ni estas sensenca, ridinda kaj mehanike senkondiĉe ne ebla.

2) La jara turniĝo de la tero ĉirkaŭ la suno daŭras 365 tagoj kaj 5 horoj 48 minutoj 46 sekundoj: altirata per la forto de la reganta lumilo, la terglobo ĉirkaŭiras ĝin kune kun aliaj planedoj. Tiu-ĉi irado estas rapida, ĉar la forto de la suno estas tre granda. La vojo, trakurata ĉiujare de la tero, egalas 936 milionoj da kilometroj dum tago, aŭ 106,700 kilometroj dum horo, 1,778 km. dum minuto kaj 29,600 metroj dum sekundo. Jen kia estas nia irado ĉirkaŭ la suno. Tiu-ĉi rapida movado ne estas tamen freneza, ĝi estas nur 1,000-foje pli granda ol rapideco de ekspres-vagonaro kaj 75-foje pli rapida ol flugo de pafilega kuglego (grenado).

3) "Precesio" aŭ antaŭiĝado de tagnoktegalco: la tergloba akso ne sin tenas konstante en la sama situacio sed sin deklinas tre simile al akso de infana ludilo "turniĝaĵo", kaj ĉirkaŭdesegnas konuson je 47 gradoj. El tio-ĉi oni povas konkludi, ke la ĉiela poluso malrapide interlokiĝas kaj ke la polusa stelo ŝanĝiĝas dum ĉiu centjaro.

Nia nuna polusa stelo estas Alfo (α) el stelaro "Malgranda Ursino", kiu sin trovas apud la daŭrigo de la tera akso sur la ĉiela sfero. Kvin miloj da jaroj antaŭ nia tempo estis kiel polusa stelo (α) el stelaro de Drako, antaŭ dekkvar mil jaroj tiela estis la brilanta stelo Vega el stelaro "Liro", post 12 miloj da jaroj ĝi ree fariĝos la polusa stelo. Tiu-ĉi malrapida konusa movado de la universa akso daŭras 25,765 jaroj. Kiam Vega estis nia polusa stelo ekzistis nek Parizo, nek Romo, nek Thebo, nek Jerusalemo, nek Babilono; ĉiuj tiuj-ĉi iamaj centroj de la homa efikeco ankoraŭ dormis en la nebula estonteco; kiam do tiu-ĉi brilanta stelo ree alvenos super nian poluson — Parizo, kredeble, estos enterigita en polvo de pasinteco, simile al Akbatano kaj Memfiso. Tiam jam oni eĉ ne memoros pri francoj, germanoj, angloj, italoj, rusoj, precize tiel kiel en nia tempo ne ekzistas asirianoj, midanoj kaj keltoj. Kiam miloj da sklavoj konstruadis la piramidojn, la poluso estis signadita per Alfo el stelaro de Drako, kaj kiam naskiĝis Jesuso en reĝado de Tiberio, tiam Malgranda Ursino turniĝadis ĉirkaŭ la poluso. Ĉiuj historiaj fariĝoj speguliĝas en la multcentjara movado de l' poluso kiel en malproksima spegulo.

*) Grandaj nombroj estas legataj malsame ĉe diversaj nacioj, tiel ke

<p>oni legas laŭ</p> <p>franca, amerikana, itala k. c. kalkulado: unu kvintiliono</p>	<p>angla, germana, sveda k. c. kalkulado: unu triliono</p>	<p>mil-</p>	<p>unu bilionej</p>	<p>mil tricent tridek- unu milionoj</p>	<p>mil cent dudek- unu</p>
<p>1,001,001,001,331,001,121</p>					
<p>unu kvadriliono</p>	<p>unu triliono</p>	<p>unu biliono (miliardo)</p>	<p>tricent tridek- unu milionoj</p>	<p>mil cent dudek- unu</p>	

La kalkula maniero de tiu ĉi artikolo estas la franca.

Rimarko de la redakcio.

4) La monata turniĝado de la tero ĉirkaŭ la komuna centro de aliro de la paro: tero kaj luno. La luno ĉirkaŭiranta la terglobo igas en sia vicinian globon translokiĝadi kaj tiamaniere tero kaj luno ĉirkaŭiras ilian komunan centron de pezo. La luno pezas 80-oble pli malmulte ol nia planedo; sekve tiu-ĉi centro de pezo sin trovas 80-oble pli proksime al ni ol al nia akompananto, t. e. ĝi sin trovas je 4,680 kilometroj de la centro de nia mondo, kaj ni ĉiumonate ĉirkaŭiras tiun-ĉi punkton.

5) "Nutacio" dum 18 jaroj kaj duono. Ĝi estas la rezultato de altirado de la luno. Nia akompananto influas je elfleksiteco de la terglobo ĉe l' ekvatoro kaj igas la mondakson ĉirkaŭdesegni malgrandan elipson; tio-ĉi alkuniĝas al komuna movado de "antaŭiĝo de tagnoktegalco" en formo de facila ŝancelado, kies daŭro egalas $18\frac{1}{2}$ jarojn.

6) La ŝanĝado de klino de la "ekliptiko" (tergloba vojo): la akso de nia planedo estas klinita je $23^{\circ} 27'$ al la plataĵo de ĝia movado ĉirkaŭ la suno; tiun-ĉi plataĵon oni nomas "la plataĵo de ekliptiko". La terglobo sin turnas je klinita situacio kaj la grandeco de tiu-ĉi klino sin ŝanĝas kun ĉiu centjaro. 1,100 jaroj antaŭ la komenco de nia jarkalkulo ("era'o") linaj astronomiistoj difinis, ke ĝi estis 23 gradoj 54 minutoj ($23^{\circ} 54'$). En 350 jaro a. N. K. (antaŭ la naskiĝo de Kristo) ĝi estis elkalkulita de Piteaso en urbo Marseljo; tiam montriĝis ke la akso klino egalas $23^{\circ} 49'$. Se tio-ĉi ankoraŭ daŭriĝos, tiam iam seniĝos jartempoj, kaj ni ĝuados ĉiaman printempon. Tian estecon oni alskribis al la unuatempa mondo; la poeto Miltono eĉ difinas la momenton, kiam nia malfeliĉa globo ekkliniĝis: tio-ĉi estis tuj post la pekfaro de Adam... aŭ de Evo; Jehovo, kolerita de ilia malobeo, tuj sendis de ĉielo anĝelojn posedantajn grandan forton kaj ordonis al ili "klinigi la malbenitan globon". De tiu tempo ni komencis suferadi vintran froston kaj someran varmegon.

Cetere tiu-ĉi ŝancelo estas tre malgranda kaj ne atingas eĉ ĝis tri gradoj.

7) La diferencado de orbito aŭ, per aliaj vortoj, — la ŝanĝado de formo de tergloba vojo: nia vaganta planedo estas sufiĉe kaprica, — anstataŭ regule, unuforme sin movi laŭ ĉirkaŭo, ĝi ĉirkaŭskribas elipson pli aŭ malpli ellongigitan. Tiu-ĉi diferencado ĉiam sin ŝanĝas. Post 24,000 jaroj ĝi estos tre malgranda, antaŭ 100,000 jaroj ĝi estis tre rimarkebla. La tergloba orbito estas simila al rezinaĵa (kaŭtsuka) ringego, kiu jen larĝiĝas, jen premiĝas. Tiamaniere nia globo estas simila je sapa veziko, kiu sin portas en aero kaj estas obeema al ĉia la plej malgranda influo...

Ĉu vi scias la kuraĝan spritajon el la tempoj de "Regentado?" — Kio estas pli malpeza ol lanugo? — Polvo. Kio estas pli malpeza ol polvo? — Vento... Kio estas pli malpeza ol vento? Virino!

Nia malgranda kaprica planedo estas entute virino...

8) Interlokiĝo de la linio de "apsidoj", kies la periodo egalas 21,000 jaroj. Per la linio de "apsidoj" oni nomas la grandan akson de tergloba orbito *). Tiu-ĉi akso ankaŭ turniĝas. 4,000 jarojn antaŭ nia "erao" la tero

*) La tera orbito (la vojo de la tero rilate la suno) estas elipso. Ĉia elipso havas du ĉefajn aksojn: grandan kaj malgrandan. La granda akso de la "ekliptiko" estas nomata (en astronomio) "linio de apsidoj". En elipso estas du "fokuso"; la suno troviĝas en unu fokuso. Kiam la tero estas plej proksime al la suno, tiam ĝi estas "en perihelio", la kontraŭan situacion oni nomas "afelio". Danke al la ecoj de elipso la ekstremoj de la granda akso estas la punktoj de perihelio kaj afelio. Se la tero sin trovas en perihelio dum la vintro (en la jaro 1230), tiam la vintroj devas esti malplej malvarmaj; se dum la somero, tiam somero (en la jaro 1190) estos la plej varma.

atingadis sian "perihelion" en 21 septembro, (t. e. en aŭtuna tagnoktegalenco). En 1230 jaro de nia erao tio-ĉi estis nur en 21 decembro t. e. en la tago de vintra "sunstarado". Tiam niaj vintroj estis la malplej malvarmaj kaj niaj someroj la malplej varmegaj. En nuna tempo "perihelio" havas lokon en 1 januaro. En la jaro 11900 niaj someroj estos la plej varmegaj kaj niaj vintroj la plej frostaj. Tiu-ĉi periodo egalas 21,000 da jaroj.

9) La "perturbacioj" sekvigitaj per ĉiam ŝanĝanta altiro de planedoj, kies influo je movado de nia globo dependas de ilia situacio kaj de ilia interspaco.

10) La translokado de la centro de pezo de nia suna planedaro: tiu-ĉi centro dependas je ŝanĝantaj situacioj de la planedoj; jen ĉirkaŭ tiu-ĉi centro, kiu ofte estas ekster suno, moviĝas tero sed ne ĉirkaŭ la suno mem.

11) La komuna translokado de la suna planedaro (sistemo) en la spaco: la suno proksimiĝas al unu punkto, troviĝanta en la stelaro de Herkulo; la suno trenas kun si la teron kaj aliajn planedojn, tiamaniere la orbito ĉiujare ĉirkaŭskribata per nia globo, ne estas fermita kurba linio, sed "spiralo" kun disvolvitaĵaj elfleksaĵoj. De la tempo de ĝia ekzistado la tero neniam iris dufoje laŭ la sama vojo. Ni forlasas malantaŭe la stelajn spacojn, kie brilas Sirius, kaj rapide nin portas al la regionoj de Liro. Se la antaŭirado daŭriĝus laŭ rekta linio, tiam ni atingus tiujn-ĉi stelojn proksimume post 500,000,000 centjaroj. Nia rapideco estas 10—12 kilometroj dum sekundo. Tiel ekzemple nur antaŭ unu horo ni sin trovis proksimume je 40,000 kilometroj pli proksime al Sirius'o kaj pli malproksime de Veg'o ol en tiu-ĉi momento.

Ĉiuhore ĉi minute ni proksimiĝas al la brilanta ĉiela Liro.

La eltrovo de la dekdua tergloba movado servis al ni kiel okazo por fari komunan trarigardon de ĉiuj tiuj-ĉi terglobaj movadoj kaj ni en unu momento povas ĉirkaŭpreni per la imago kaj penso ĉiujn grandegajn fortojn, regantajn en la universo. Tiaj altecaj observadoj havas kapablecon levigadi niajn konsiderojn supren, for el trivialeco kaj malalteco de nia ĉiutaga vivo.

Insulo Stenŝler, 17. VIII. 1898.

F. Postnikov.

Prologo.

El verkoj de Gustaf af Geijerstam.

La diinoj de la Sorto staris apud lulilo de knabo, kaj lia patrino demandis: "kio fariĝos de tiu ĉi infano?"

Tiam sin klinis super la sterno la diino de la pratempo, aŭskultis al la spirado de l' infano kaj parolis: "Li vagados senpace ĉirkaŭten en la mondo. Miajn trajtojn li rigardados kun neniam haltigota timo, sed mi povas nenion doni al li. Ĉar mian posedaĵon li rifuzados kiel eluzitan ŝtofon."

Timema la patrino ekrigardis al la ambaŭ ceteraj diinoj, kaj la *norna* *) de l' estanteco, la ĉiam estanta, alpaŝis kaj per la mano karesis senvorte la blankan frunton de la knabo.

Sed la *norna* de l' estonteco dejetis la vualon de sia vizaĝo, kisis liajn lipojn, lian frunton, liajn okulojn, kaj en ŝia propra okulo ekbrilis larmo: "Vi serĉados min, sed neniam min atingos. Mi ĉiam forkurados de vi. Vi maldolĉiĝos, kaj via sento malgajiĝos, al viaj plej proksimaj vi faros malĝojon, ĉar vi povas ami nenion el tio, kio estas. Vi portados la mokon sur la lipoj kaj la

*) *Norna*: diino de la Tempo kaj Sorto en la skandinava mitologio.

malĝojon en la koro. Inter homoj vi estos kaŝema kaj malvarma. En via interno vi elkonsumiĝos pro amo, ĉar vin amos neniu kiu ne similas al vi, kaj via vivo estos daŭra batalado. En la sanktejo de via popolo vi ne fleksigos viajn genuojn, sed via koro malrapide elkonsumiĝos pro sopirado al la dio de l' amo.

La larmoj de la patrino fluegis, ĉar ŝi pensis ĉian la malĝojon, kiu venos, kaj ŝi demandis: "Kio li do estos?"

Respondis tiam la diino de la nuno, la ĉiam estanta: "Kun miloj da aliaj — infano de sia tempo."

Sed la *norna* de l' estonteco aldonis: "kaj tamen li kiel neniu el tiuj ĉi miloj iam eksciigos, ke li vivis pro mi."

Trad. el lingvo sveda **P. Ahlberg.**



El Lermontov.

Nubetoj ĉielaj, eternaj migrantoj,
vi iras en perla kateno ligitaj,
vi iras sur blua azuro pasantoj
el nord', kara nord', kiel mi elpelitaj #).

Do kiu vin pelas? Ĉu sorto fatala?
koler' malkaŝita? sekreta envio?
Nubetoj, ĉu premas vin ag' kriminala?
aŭ, eble, venena amikkalumnio?...

Ne! Vin ne turmentas pasioj suferaj;
nur volas vi lasi la nudan kampaĵon...
Vi, ĉiam malvarmaj, eterne liberaj,
ne havas patrujon kaj elpelitaĵojn.

S. Sviridov.



Bulgarujo en statistika rilato.

La bulgara regno havas la spacon de 95,705 kvadrataj kilometroj kaj 4,699 loĝitajn lokojn, t. e. en 20,36 kilometroj oni havas 1 lokon loĝitan. Ĉiuj domoj estas 552,027 aŭ 5,77 en kvadrata kilometro. En unu kvadrata kilometro loĝas 34,59 homoj, ĉar la tuta loĝantaro en la regno estas 3,310,713 homoj. Por unu domo sekvas 5,71 homoj. La viroj estas 51 % de la loĝantaro, kaj la virinoj — 49 %. De la loĝantaro 83,6 % homoj estas naskitaj en malgrandaj komunumoj (en urbetoj, en vilaĝetoj).

La kristanoj ortodoksaj estas 2,606,786 (78,74 % de la loĝantaro). De la tuta loĝantaro 2,505,326 homoj estas bulgaroj, t. e. 75,67 %, kaj turkoj — 569,728 (17,2 %). Homojn apartenantajn al fremdaj regnoj (fremdaj loĝantoj) havas oni 38,076, t. e. 1,15 %. Infanojn de 7—12 jaroj oni havas 552,902 (16,7 %). Sciantaj legi kaj skribi 517,441 homoj, t. e. 15,6 %. De la loĝantaro 1,690,626 homoj estas viroj, de kiuj 410,973 sciantaj legi kaj skribi, t. e. 24,3 %. La virinoj estas 1,620,087, de kiuj 106,468 scias legi kaj skribi (6,2 %)

¹⁸/₃₀ Aŭgusto, 1898 jaro. Vidin, Bulgarujo.

Eltiris **Ilarion Rajĉef.**

#) Lermontov laŭ ordono de imperiestro Nikolaj I estis forsendita el S. Peterburgo Kaŭkazon pro liberpensemece.

De niaj abonantoj.

Königsberg i. Pr. Kgl. Universitätsfrauenklinik, la 1 Sept. 1898.

Estimegata redakcio!

Rilate la proponoj faritaj en la antaŭlasta numero de l' gazeto L. I. de s-ro M. S. Rakitski mi permesas al mi fari kelkajn rimarkojn, kiuj eble povas interesi ankaŭ aliajn legantojn de nia L. I. kaj kiuj eble pro tiu ĉi kaŭzo estas al vi ne maloportunaj kiel malgranda aldono por nia gazeto L. I.

Rilate la unua artikoleto "Poŝta kesto" mi nur povas korege konsenti kun s-ro R. tiel, kiel eble ankaŭ la ceteraj legantoj de L. I. salutas kun granda ĝojo tiun ĉi novan aranĝon de la redakcio. — Tiel aranĝo estas ne sole por la abonantoj nova kaj tre interesa rubriko, ĝi pligrandigos kaj faciligos ankaŭ la interkomunikiĝojn de la abonantoj interalie, se abonantoj respondos en la gazeto al demandoj kaj proponoj de abonantoj. La grandega okupo de nia estimata redakcio certe estos plimalgrandigata per tio ĉi kaj la ligilo, kiu jam hodiaŭ ĉirkaŭprenas la abonantojn de la "L. I." estos farata ankoraŭ pli forta per tielaj réktaj interkomunikiĝoj de la abonantoj interalie.

Rilate la dua artikoleto bedaŭrinde mi ne povas konsenti senkondiĉe kun s-ro R. Certe ankaŭ mi opinias, ke aparta rubriko de la plej interesaj artikoloj de naciaj gazetoj kaj ĵurnaloj interesas la plej multajn abonantojn en la unua tempo, sed ankaŭ nur en unua tempo, ĉar supozite ankaŭ, ke nur la plej interesaj artikoloj estos tradukataj kaj presataj, ni tamen povas facile imagi, ke la enhavo de tielaj artikoloj estos pli malpli egala kun malgrandaj diversajoj. Pro tiu ĉi kaŭzo povas okazi tio, kion s-ro R. volas tute eviti per siaj proponoj: la rubriko fariĝos enua, ĉar ĉiu povas jam antaŭe imagi al si la enhavon de la artikoloj kaj neniu legos la rubrikon, kies la enhavon li kredas koni jam ne leginte. Mi kredas, ke ĝi estus la plej bona, se la artikoloj de gazetoj naciaj estus presataj sammaniere, kiel pli frue, t. e. se en la plej multaj okazoj nur estus presataj la titoloj de la gazetoj, kiuj parolis pri nia afero.

En neniu okazo mi povas konsenti, ke pro tiela rubriko ne devus esti presota plue la beletristiko en nia gazeto, ĉar la beletristiko tute pro ĝia internacieco donas al ĉiu leganto ion interesan kaj ĉiam ion novan. Sekve mi kredas konsenti kun la plej multaj abonantoj petante la estimatan redakcion, ankaŭ plue presigi belektristikajn artikolojn en nia gazeto "L. I."

La propono pri la portreto de s-ro Zamenhof certe estos salutota de ĉiuj kun grandega intereso kaj ĝojo, sed mi kredas, ke estus eble pli bone, se tia ĉi portreto estus farota iom pli granda — ĉirkaŭ 15×20 cm. — ĉar ĉiu fervora esperantisto volonte pagos ankaŭ iom pli grandan sumon por tiela portreto. Eble la redakcio povus kalkuli la portreton iom plimultekosta, ol estas la kostoj de la farado; la sumo, je kiu la sendita mono estos pli granda ol la kostoj de farado, certe ne estos maloportuna al la kasisto de "L. I."

Finigante mi povas nur ankoraŭ fojon peti la redakcion efektivi la proponon de s-ro R. pri la "Poŝta kesto" pro la utilo de la abonantoj kaj pro la plifaciligado de la redakcio mem. Kun saluto internacia mi restas estimegante Via

Dr. Ad. Ebner.



Informejo de Esperantistoj.

Dezirata korespondadi esperante s-ro *A. Zakrjevski*, Troicki prospekt, dom Ananina, *Arĥangelsk*, Rusujo.

Agentoj de la lingvo Esperanto:

28. S-ro *Mihel Sapojnikov*, (Kontoro de inĝeniero I. F. Kurovskij). *Kašira* (gub. de Tula). Rusujo.

La gazeton Lingvo Internacia oni abonas:

- en Ameriko ĉe R. Geoghegan, *Tacoma*, Washington, U. S. A.
- „ Francujo ĉe L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.
- „ Germanujo ĉe W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.
- „ Portugalujo ĉe d-ro Costa e Almeida, *Rezende*.
- „ Rusujo ĉe V. Gernet, Jamskaja, 92, *Odessa*.

Ĉe tiuj ĉi sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon. En aliaj landoj oni mendas la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio, adr. *Upsala*. La monon oni plej bone alsendas per poŝta mandato.

L'Étranger, Organe de la société d'études internationales

eliradas ĉiumonate per granda n:o, kiu ĉiam enhavas tekston esperantan kun franca traduko. Kostas en tuta mondo 8 frankojn ĉiujare. Abonanto de tiu ĉi gazeto ankaŭ havas la rajton fariĝi membro de la societo "Correspondance Internationale" (I. C.), kiu kalkulas ĝis nun ĉirkaŭe 300 membrojn.

Adreso: *L'Étranger*: 77 rue Denfert-Rochereau, Paris.

L'Espérantiste

monata gazeto publikigata en la franca kaj esperanta lingvoj

havas la celon propagandi Esperanton en la landoj uzantaj la lingvon francan kaj entute apud ĉiuj komprenantaj tiun ĉi lingvon. Per tekstoj kaj konsiloj specialaj, ĝi potence helpadas al la adeptoj pri la perfekta akiro de Esperanto.

Por ricevi *L'Espérantiste* oni povas: aŭ simple aboni ĝin (3 fr. en Francujo; 3 fr. 50 en la aliaj landoj) — aŭ fariĝi membro de la Societo por la propagando de Esperanto (4 fr. por jara enpago).

Sin turni al S-ro René Lemaire, sekretario de la societo, en Epernay (Marne), Francujo.

Speciala instruado de

Librotenado

kaj komercaj kalkuloj

per korespondado en lingvoj: rusa kaj hebrea. La rekompenco estas tre modera. Prospektojn kaj provajn leterojn mi sendas al ĉiu, kiu sciigas min pri sia adreso.

Mia adreso estas:

Julius Levik, Berdiĉev (Rusujo).

Al atento de la rusaj esperantistoj.

Nova, perfekta, simpligita, tre facile ellernata metodo de Rusa Stenografio de J. A. Ĵivotovski en kvin leteraj lecionoj. La kondiĉojn kaj prospekton oni elsendas senpage.

Odessa, Maly per. N:o 1.

Al J. A. Ĵivotovski.

Per Esperanto.

Danke al Esperanto.

Enhavo de tiu ĉi numero.

	paĝo		paĝo
<i>L'Espérantiste</i> de Paul Nylén	129	<i>Ĵurnalistoj observu!</i>	137
<i>Novaĵoj</i>	130	<i>Dekdu movadoj de la tero</i> de F. Postnikov	138
<i>Malfermo de la Filio de la Societo</i>		<i>Prologo</i> de P. Ahlberg (trad.)	141
<i>Espero en Smolensk</i>	131	<i>El Lermontov</i> de S. Sviridov	142
<i>El Smolensk</i> de A. Zakrjevski	132	<i>Bulgarujo en statistika rilato</i> de Ilarion Rajĉef	142
<i>El Heine</i> de A. Kofman	134	<i>De niaj abonantoj</i> de Ad. Ebner	143
<i>La Vorto Dia en lingvo internacia</i>		<i>Informejo</i>	143
de Homarero	134	<i>Anoncoj</i>	144
<i>Ankoraŭ pri skribado de propraj nomoj</i>			
de Paul Nylén	136		